

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

mardon, la 7-an de Julio, 2015 • numero ok

Kio okazos hodiaŭ?

★ 8:30 – 12:15 atm
Lecionoj



★ 2:00 – 3:15 ptm
Radikala paco

Jarlo BILLS prelegos pri projekto por interparoligi judajn setlintojn kaj palestinajn aktivulojn en Cisjordanio.

★ 3:15 – 4:30 ptm:

La unua mondomilito

Paŭlo GUBBINS prelegos pri la unua mondomilito kaj kiel ĝi tuŝis la vivojn de ordinaraj britaj esperantistoj.

★ 7:00 – 7:30 ptm: **Ĉu vi dormemas?**

Jano UNDERWOOD prezentos al ni hipnotige interesan programeron pri hipnoto, kaj kiel ĝi efikas por sano.

★ 7:30 – 8:00 ptm: **Retmono**

Johano UNDERWOOD prelegos pri la nova fenomeno de retmono, kaj specife la valuto *Bitcoin*.

★ 8:00 – 9:00: **Distra vespero**

Tempo por kanti, aktori, deklami poezion, ludi muzikon, ktp. Venu kaj amuziĝu!

Notu: ĉiuj eventoj okazos en Flowe.

La NASKa Fasko

Redaktejo: Finley 112

<nask.esperanto@gmail.com>

La *NASKa Fasko* estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, plendon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al:

<nask.esperanto@gmail.com>

Radikala paco:

Kiel amikeco inter palestinaj

aktivuloj kaj judaj setlintoj povas sangi ĉion

Jarlo BILLS

Ek de 1967, cionistoj starigas novajn urbojn en Cisjordanio, la teritorio ĉe la okcidenta flanko de la rivero Jordano. La plej viglaj el tiuj setlintoj estas la religiaj cionistoj, kiuj realigas la revenon de la juda popolo al la Lando. Apud ili, loĝas palestinanoj en siaj propraj vilaĝoj. Ambaŭ grupoj malkonsentas forlasi la Landon kaj

malkonsentas pri restado de la alia.

Radikalaj judoj. Radikalaj palestinanoj. Ili ne loĝas kune kaj ne interparolas... ĝis nun. La organizo *Roots* (“*Radikoj*”) aranĝas paroladon inter setlintoj kaj iliaj palestinaj najbaroj. Ili akordas pri preskaŭ nenio, sed ili parolas. Ĉu tio ne estas la Interna Ideo?

je la 2-a
ptm

Ĉu vi... dormemas?

Jano UNDERWOOD

je 7:00
ptm

Estas multaj tagoj en via NASKa sperto nun. Ĉu vi sentas vin laca aŭ streĉita? Ĉu via menso estas tro plena?

Ne zorgu! Venu al mia prezentaĵo pri hipnoto por sano. Vi lernos pri hipnoto kaj ĝuos gvidon en malstreĉan staton dum via menso organizas ĉion, kion vi lernis.

Retmono kaj Bitcoin

Johano UNDERWOOD

La retmono “*Bitcoin*”, subite aperinta antaŭ kelkaj jaroj,

donos avantaĝojn al internacia movado. Mi parolos pri kio estas retmono, kiel ĝi funkcias, kaj kiajn eblecojn ĝi donos al movado kiel la nia.

je 7:30
ptm



Saluto de NASKano el fora Kubo

Karaj samideanoj kiuj nun estas ankaŭ NASK-anoj.

El tiu ĉi proksima kaj samtempe malproksima urbeto en la provinco Kamaguejo, en Kubo, mi deziras saluti varme, frate, kaj emocie la NASK-anojn kiuj nun prenas ŝancon asimili konojn pri tiu juvelo kiu riĉigas la homojn: Esperanto. Mi povas certigi tion proprasparte ĉar danke al Esperanto kaj samideanoj el kelkaj mondopartoj, mi, kamparandevena kaj malriĉa profesoro, ĝuis mondfamajn lokojn kaj sukcesis viziti kelkajn eŭropajn landojn dum 1998 kiuj ege ampleksigis mian kulturon kaj sperton pri aliaj landoj kaj la loĝantoj.

En 2013 mi estis tre privilegiita viro: mi ankaŭ estis NASK-ano. Samideanoj el Kalifornio helpis per fonduso, samtempe kun kontribuo el aliaj landoj, kaj ebligis mian vojaĝon al Usono kaj mian partoprenon en NASK, samkiel en ilia 61-a Landa Kongreso. Mi estis ununura kubano partoprenanta en NASK. Kelkaj usonaj samideanoj estis strange mirigitaj

ĉar, iamaniere mi defiis tendencon malpermesi la kubanojn partopreni en usonaj eventoj, sed mi estis tre fiera kaj ĝoja apud miaj usonaj fratoj.

Mi pardonpetas: mia koro batas cele menciitajn, kiuj tre afable kaj frate helpis min, sed mi timas forgeson. Ĉiuj kiuj estis tiutempe ankaŭ NASK-anoj memoros pri mia ĉeesto.

Dum neforgesebla semajno en tiu modesta, komforta kaj frata WPU, mi lernis ke usonanoj kaj kubanoj estas fratoj kiuj devas alproksimiĝi unu la alian.

Hodiaŭ mi sendas al ĉiuj mian koron kaj miajn plej belajn pensojn kaj sentojn. Al ĉiuj kiuj min helpis, gastigis kaj promenis, mi varme brakumas kaj sendas miajn dezirojn de sano kaj feliĉo. Se iu NASK-ano emas sendi al mi mesaĝon, tiam mi estos plenfeliĉa.

Vin varme manpremas,

— Prof. Ricardo Salazar Crespo.
 <srudys@finlay.cmw.sld.cu>

[Al siaj lernantoj Paŭlo donis la jenan taskon: “Verku mallongan poemon, en kiuj ĉiuj versoj rimiĝas per -elo, -ino, aŭ -anto.” Jen kelkaj rezultoj. —Red.]

Laca patrino,
 taso da vino
 sur la sino:
 vesper-fino.

— Derek ROFF

Ĉu ekzistas bela kanto,
 kiun verkis elefanto?
 Jes, sed damne, kia vanto,
 ne kantita en Esperanto!

— Derek ROFF

Ie en kelo,
 Vir’ en kitelo,
 Tre forta elo,
 Violonĉelo:
 Son’ de malbelo.

— Ray REDD

Leterkesto



Ĉu vere hazarda?

Leginte en la dimanĉa Fasko pri la neatendita ŝaumo en la grandkorta fontano, mi tuj rimarkis ke la onidiro kiun raportis Ray REDD koliziis kun respondo de ĝardenisto al mia enketo pri ĝuste tiu temo. (Pli belan foton tamen mi eĉ ne provis trovi.)

Lundon, serĉante la veron, mi bonŝance renkontis tri diplomitojn de la universitato, kaj ĉiuj konfirmis alian historion. Ŝajnas ke laŭ multjara tradicio, por konkrete kaj pli gajige atentigi pri gravaj momentoj de la lerneja jaro, studentoj – ofte nokte kaj kaŝe – enfontanigas sufiĉan sapon por krei tiom da bobeletoj ke ili eĉ superŝutas la ĉirkaŭan terenon. Ekzemple, kvin tagojn antaŭ la fino de la universitata jaro, la diplomotoj “sapumas² la fontanon” antaŭ ol mem ensalti ĝin. Alia sapumado bonvenigas la novajn studentojn jarkomence.

Eblas do konkludi ke se ankaŭ vi decidus refreŝiĝi en tiu akvo, vi havus nediskutindan precedencon.

— Bill MAXEY

Z: zamenhofa vorto

Hajko klaĉa

Ŝaŭmas fontano.
 Ĉu vere senintence?
 Bill malkonsentas.

— anonimulo



Por Ray kaj Cassidy, la muzeo-ekskurso estis ege serioza afero. (Foto fare de Mara ROCKLIFF.)